

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

Sonorilo

65-a jaro, n-ro 3-4
junio-julio-aŭgusto-septembro 1973
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,
2710 Hoboken.

Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo: d-ro P. Denoël (Lieĝo),
Roger Seyen (Bruselo), s-ino L.
Vertongen (Eŭpeno).

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la
fondaĵo. Antaŭdankon!



MET WELGEKEMDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GERED E KLEDING .

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ



4-a B.E.F. – karavano al la suno

Ekster la suno kiu estis en nia koro, la vetero ne promesis multe da suno, kiam ni enŝip(?)iĝis por la "granda vojaĝo". Kelkajn tagojn poste mi kredis ke mi devus raporti "...al la suno kaj la pluvo" kiuj efektive alternis. Nun, post la vojaĝo, ni devas diri ke ni havis bonŝancon kun la vetero. Ĝi estis nek malvarma, nek tro varma. Nur unu tagon ni preskaŭ brulis, nome en Moŝtar. Sed jam la postan tagon en Sarajevo, kie ni logike povis atendi saman varmecon, estis kontraŭe tre milda vetero. Kaj en Ivangrad, kie denove laŭ logiko, ni povis atendi varmegon, estis eĉ iom malvarme. Ŝajne la vetero estas tiel logika kiel la homo.

En Germanujo, sur la plej bonaj aŭtovojoj en nia kontinento, ĉio iris plej glate. Ni vizitis la ĉarman urbon Ulm, kun la plej alta preĝejo turo (160 m.) kaj kun la ege pitoreskaj kvartaloj apud Danubo. Unuan emocion ni havis ĉe la eniro de la Hoch-Alpenstrasse, kie la aŭtobuso, kiu havas la maksimume internacie permesitajn dimensiojn, ne povis subiri trajnoponton. Ĉu tio estus unua malsukceso: ne vojaĝi tra kaj sur la majestaj Alpoj? Grandega timo ĉe tiuj kiuj unuafoje faris tiun vojaĝon. Feliĉe ni trovis el- kaj enirejon tra tereno de fabriko. Tamen ni havis malbonŝancon pro la malfavora vetero kiu faris ke sur la plejalto ni vidis.. nenion. Tiuj kiuj estis tie antaŭ dek jaroj memoris la neforgeseblan vidon de la montopintoj i.a. la Grossglockner. Multe da neĝo ĉirkaŭis nin, kaj iom pli malalte ni havis ravegajn naturbelaĵojn. Laŭ la Loibl-paseo ni eniris Jugoslavion, kaj ankaŭ tiu vojo estas travivaĵo kun tre krutaj deklivoj. En Ljubljana, la hotelo Ilirija tre plaĉis. Same la grotjo de Postojna, kaj, vespere, la kolorriĉegaj kaj movoplenaj popoldancoj. La postan tagon ni surveturis LA grandan kaj longan "autoput" al Beograd. Nu, tiu vojo restis absolute la sama kiel antaŭ dek jaroj; kun tiu diferenco ke tiam estis preskaŭ neniu aŭto, dum ke nun la trafiko iĝis tre densa. La sekvojn vi povas imagi: senpaciencaj veturantoj kiuj ne rapide antaŭeniras, kiuj riskas danĝeregajn preterpasojn, kaj la neeviteblaj akcidentoj i.a. mortiga akcidento. Feliĉe ke nia ŝoforo veturis tre singarde. Intertempe venis ankaŭ la unua varmo. Tion spertis i.a. la prizorganto de la "bar", Guido Maertens, kiu tiamaniere povis komenci la konstruon de sia riĉeco. Ĉu necesas mencii ke la tuta

karavan-anaro iĝis granda familio? Ke la junaj anoj estis en ĉiuj cirkonstancoj tre helpemaj? Specialan laŭdan parolon ni ŝatus tamen direkti al du handikap- itaj karavaninoj, kaj al s-ino Chomette, kiu venis el Los Angeles kaj vojaĝis al la kongreso... kun rompita kruro! Kian ekzemplon de kuraĝo tiuj tri montris!

Ankaŭ en Beograd la hotelo estis tre komforta kaj plaĉa. Prefere ni tie-ĉi ne raportu pri la kongreso mem, kiu havis bonajn kaj malbonajn elementojn. Tie la karavananoj ne plu vivis kune; ili iris iom sian vojon laŭ interesiĝo kaj laŭ konateco kun gekorespondanto-geamikoj. Unu eĉ foriris konstante kun korespondantino... de alia! Sed tio apartenas al la agrabla varieco de la kongreso. Beograd mem estis tre vizitinda pro la modernigo de la urbo kaj la interesaj restaĵoj de impona pasinteco.

Ĵaŭdon la 2-an de aŭgusto komenciĝis la dua parto de nia vojaĝo: la turisma. Ni esploras la landon Jugoslavio. Unua vojaĝo kondukis nin laŭ Niš — kie ni mal-feliĉe ne povis admiri (?) la unikan statuon kie sultano Mustafa Pacha enmason- igis la kapojn de la venkitaj ribelintoj — kaj laŭ la ege pitoreska Vranje, kie ni renkontis la solan esperantiston de la urbeto, al la ĉefurbo de Makedonio, la triste fama Skopje. De nia hotelo kiu portas rajte la nomon "Panorama" ni efektive ĝuis belan panoraman vidon super tiu urbo. Depost la tertremo de 1963 ĝi registris jam pli ol 700 tremoj. Ĝi iĝis granda urbo kiu anstataŭas nun la iaman malpuran mahometanan Skopje. La donacoj kiuj venis de ĉie en la mondo klarigas ĝian kreskon kaj modernecon. Restis tamen la antaŭa turka kvartalo kiu estas vizitinda. En la sekvintaj tagoj ni havis ravegajn pejzaĝojn por admiri, ĉu en belegaj montregionoj, ĉu en krutegaj ravinoj; foje sur aĉega voj(et)o, foje sur vojo kiu vekis ĝeneralan admiron pro la multaj pontoj kaj tuneloj. Ni aldonu ke ĉiuj dioj kaj diinoj (mi ne scias precize kiom ekzistas) estis favoraj al ni, ĉar ili ŝparis la akcidentojn.. por aliaj vojaĝantoj! Ni certe ne rapide forgesos la golfon de Kotor. Verŝajne por ĉiuj la restado en Dubrovnik estis la apogeo. Kia ĉarmega urbo! Kaj kia ĉarmega marbordo! (ankaŭ la gvid- antino estis ĉarma). Kaj kiel agrable estis en la hotelo mem! Tie ni volonte estus restintaj plia(j)n tago(j)n! Sed ni devis vidi ankaŭ Moŝtar kaj Sarajevon. En Banja Luka ni pasigis la lastan Jugoslavian vesperon. Tie okazis malgranda ceremonio por montri al S-ro Maertens nian dankemon pro ĉio kion li faris por ke ni povu havi tian vojaĝon. S-ino H. De Kersgieter en tre flua parolado rivelis parton de la giganta laboro kiun faris S-ro M.... kaj lia edzino. Decis do kunigi ŝin en la honorigo kaj memori tion per aparta donaco. S-ro Maertens ricevis grandan reproduktajn de ikono kaj lia edzino filigranan broĉon. La reven- vojaĝo estis grandparte kiel la forirvojaĝo. Sed en Aŭstrujo ni trapasis la Tauerntunelon pli ol 6 km. longa. Ni admiris la belegan Orient-Tirolon kaj, vespere, akceptis nin en "Goldener Fisch" servistino pli ol ordinare servema. Sabaton, en Augsburg, estis ree S-ano Schmidt kiu enordigis la tagmanĝon. Dankon al li. Sed pro la malfrua horo ni devis rezigni viziton al la historia urbo. Dimanĉon ni estis lastfoje kune en la sama restoracio kie S-ino Vertongen aranĝis la tagmanĝon. La unuaj nin forlasis jam. Jen venis fino de trisemajna kunvivado en belega vojaĝo. Ni dankas ĉiujn kiuj partoprenis, ĉar ili zorgis ke ni povis travivi ion kio apartenas al la plej belaj momentoj de nia vivo.

Unu kiu ankaŭ partoprenis

Raporton pri la kongreso mem, vi trovos en la venonta numero.

KONKURSO SIMONDETTI 1973

Ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti de 1000 BF (aŭ egalvaloro en libroj), al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri tre ĝenerala temo "Naturo". Por 1973 partoprenis ĉi sekvaj kvin kandidatoj, laŭ malkreska vicigo, el kiuj la unua sekve gajnis:

E.W. Chandler el Aŭstralio kun "La Lovano"
G. Gárdonyi el Rumanujo kun "Nia Cikonio"
G. Pollard el Aŭstralio kun "La Emuo"
A. Liszy el Hungarujo kun "Observo de birdaro"
G.H. Atanasov el Bulgarujo kun "Murhirundo"

Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en "La Mevo", organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1974 bonvolu peti la regularon al la sekretario M. Halvelik, Gebr. Blommestraat 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

LINGVOLABORATORIA KURSO EN GRONAU

La plej moderna landa sekcio de TEJO, nome Germana Esperanto- Junularo, okazigos la 9-an ĝis 14-an de oktobro intensan lingvolaboratorian kurson en Gronau (Westfalio). La novfondita junulara Esperanto-grupo kunlabore kun GEJ alparolas ĉiujn lernejojn de la limregiona distrikto por ke la kurso estu internacia laŭ konsisto de partoprenantoj. Krom 6-hora lingvo-studado ĉiutage estas antaŭvidataj ankaŭ distraj programeroj. Partoprenantoj de la kurso estos ĉefe junaj instruistoj kaj lernantoj el Westfalio kaj Nederlando.

Kontaktadreso:

Konrad Franke, 4432 Gronau, Herzogstr. 42, FRG

LINGVAJ MALFACILAĴOJ EN LA TELEKOMUNIKOJ

La Belga regio pri telegrafio kaj telefonio ricevis dum januaro 1973 el la Irlanda administracio analoga teleskribajn en kio oni plendis pro la fakto, ke la telekomunikaj teknikistoj en Bruselo ne parolas la anglan lingvon. La konsekvencoj estis, ke radiofonia programo ne povis esti dissendata en Irlando ĉar la cirkvito ne povis esti ŝaltita en Bruselo inter la studio de E.K. kaj la kablo Bruselo-Dublino. La teleskribajo finiĝas per la deziro de la Irlanda administracio meti sub ĝia dispono teknikiston parolantan la anglan lingvon ĉiufoje kiam la radiofonia cirkvito devos esti konsistigita inter Bruselo kaj Dublino.

Jen estas ja trafa ekzemplo de la plurlingvismo, kiun E.K. promesas al ni. En la praktiko oni konstatas, ke hierarkio stariĝas inter la lingvaj grupoj: la anglo- lingvanoj parolas nur la anglan lingvon; la franclingvanoj devus paroli la anglan lingvon; la germanlingvanoj, la anglan kaj la francan lingvojn; la nederland- lingvanoj, la anglan, la francan kaj la germanan lingvojn; ktp. Estas pura diskriminacio, kiun la blindaj estroj de E.K. volas ignori.

Roger SEYEN

Telefona ŝtatoficisto en Bruselo

UNUA EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO EN LUKSEMBURGO

Dum la Pentekostaj tagoj okazis en Luksemburgo la unua Eŭropa Esperanto-kongreso post la starigo de la nova E.K. de naŭ landoj (Belgio, Nederlando, F.R. Germanujo, Francujo, Italujo, Britujo, Ebro kaj Danujo).

Ĉirkaŭ 600 reprezentantoj de ĉiuj Esperanto-organizoj el tiuj landoj estis venintaj al Luksemburgo, la ĉefurbo de Eŭropo. La kongreso estis aranĝata de Luksemburga Esperanto-Asocio, la plej juna landa Esperanto-asocio konsistanta el preskaŭ nur lernintoj de la germanlingva kurso por memstudado "Esperanto Programita".

La ĉeftemo de la kongreso estis "Esperanto en Eŭropo".

BEF estis komisiita organizi la Laborkunsidon de la Eŭropa Kongreso. La estraro de BEF dissendis planon por la tagordo al la ceteraj organizoj. Ankoraŭ antaŭ la kongreso estis transdonita al ĉiuj Landaj Asocioj de landoj apartenantaj al la Komuna Merkato dokumentaro, kiu i.a. enhavis la definitivan tagordon kaj proponojn por la laborprogramo.

La laborkunsido okazis dimanĉon posttagmeze. Ĝin prezidis D-ro P. Denoël, kiu unue substrekis la ĉefajn punktojn de la laborprogramo submetita al la diversaj Landaj Asocioj. La esencaj direktoj de niaj klopodoj devus esti la parlamentanoj, kun la celo krei favoran influgrupon en la Eŭropa Parlamento, kaj la oficistaro de E.K. Estas ankaŭ por ni grandaj ŝancoj trovi aliancantojn en la "Eŭropa Movado" kaj en la "Eŭropa Instruista Asocio", ne neglektante la eŭropajn lernejojn (i.a. la e. kolegio de Bruĝo) La agadrimedoj devus konsisti el instruado kaj premado. La taskoj antaŭviditaj de la landaj asocioj devus esti kunordigitaj de speciala Centro, kiu rilatos kun diversaj fakaj laborgrupoj (ekz. por la Eŭropa Movado, por la Instruista Movado, por la Junularo, ktp.) La Centro disponos pri sia propra fonduso.

La reprezentantoj de la kunorganizantaj Landaj Asocioj partoprenis la diskuton, sed ĝenerale ili aprobis la proponojn de BEF. Prezidanto Lapenna faris la historion de la UEA-klopodoj sur la eŭropa kampo.

Universala organizaĵo, UEA ne povas rekte interveni en tiu regiona tereno, kvankam ĝi estas ĉiam preta kunhelpi. En la ĝenerala diskuto ambasadoro R. Harry konsentis kun la neceso kunmeti specialan terminaron por la eŭktratoj kaj ili promesis monpremion por la tradukonto de la Eŭropa Traktato. S-ro Calado proponis monkolektadon dum la distra vespero por komenci la fonduson.

La kunsido aprobis la proponojn por la laborprogramo, kiuj estas resumitaj en Luksemburga Konvencio, ratifikota de la L.A. Kolegato de Reprezentantoj de la L.A. estis elektita kaj, post la kunsido en aparta kunveno, ĝi enoficigis D-ro Denoël kiel direktoron kaj s-inon Hoekstra kiel administrantinon de la Centro. (La konvencion pri la Eŭropa Esperanto-Centro vi povas trovi aliloke en tiu ĉi "Sonorilo")

La dimanĉo de la kongreso komenciĝis per ekumena diservo sekvata de oficiala kunsido. Dum tiu ĉi kunsido oni i.a. transdonis la bondezirojn de Grandduko Jean de Luksemburgo, de ministro Scheel de Germanujo kaj de multaj aliaj el la politika vivo. Krome estis membroj de la honorkomitato: Renaat van

Elslande, belga ministro pri eksterlandaj aferoj (kiu interkrampe dum alia okazo deklaris esti kontraŭulo de Esperanto...), Hans Apel, ŝtata sekretario de Germanujo, f-ino Colette Flesch, urbestro de Luksemburgo kaj prof. Hendrik Brugmans, eksrektoro de la Eŭropo-Kolegio en Bruĝo. Festparoladis prof. Ivo Lapenna, prezidanto de UEA. Li i.a. menciis ke en la statutoj de EK kaj de Komekon troviĝas ke la gepatra lingvo de ĉiuj enloĝantoj devus esti konsiderata egala al ĉiuj aliaj. Bedaŭrinde en EK la franca lingvo estas iom pli egala ol la aliaj, kaj en Komekon la rusa. Se oni vere volus apliki la regulojn pri lingva egalrajteco, ĉiuj oficistoj de la estonta Unuiginta Eŭropo devus koni tridek ĝis kvindek lingvojn.

Dum la posttagmezo denove okazis Esperanto-geedziĝo. Sinjoro el Dendermonde edziĝis kun fraŭlino el Japanujo. Kaj el vidpunkto de nacioj reprezentataj, kaj el vidpunkto de religioj, la edziĝo estis eksterordinara. Ĝi okazis inter Aziano kaj Eŭropano. Kiel atestantoj servis Afrikano kaj Oceaniano (s-ro Ralph Harry el Aŭstralio). Ĉeestis dum la diservo katolikoj, kristanoj, islamanoj, budhanoj kaj liberpensuloj.

Oni finis la tagon per kultura vespero dum kiu la franca Esperanto-organizo prezentis teatraĵon kaj ni diasonoramon pri Antverpeno de Bob de Wachter.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

La dua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj okazos de la 4-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1974 en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo en Sart-Tilman. La programo ampleksos la studdirektojn socio-lingvistiko, biologio kaj kemio.

Programo

Jam estas deciditaj jenaj kursoj:

"Planktono kaj mara produktado" (Enrique Balech, profesoro pri biologio — estro de la Hidrobiologia Stacio en Quequén — estro de la sekcio "Mara biologio" de la Argentina Muzeo de Natursciencoj; Argentino).

"Fundamentaj konceptoj en kemio" (D-ro Sin'itirō Kawamura, profesoro pri biologika kemio — Universitato de Kagawa; Japanujo).

"Enkonduko en organikan kaj biologian kemion" (D-ro Sin'itirō Kawamura, v. supre)

"Novaj manĝaĵoj (artefarita bovaĵo el sojoj, mikroorganismoj el petrolo, k.a.)" (D-ro Sin'itirō Kawamura, v. supre)

"Enkonduka kurso pri algoj" (D-ro Ralph A. Lewin, profesoro pri mara biologio - Scripps Instituto de Oceanologio, Universitato de Kalifornio, La Jolla; Usono)

"Utilaj kaj malbonfaraj algoj" (D-ro Ralph A. Lewin, v. supre)

"Enkonduko en ĝeneralan biologion" (D-ro Carl Støp-Bowitz, profesoro pri zoologio — Universitato de Oslo; Norvegujo)

"Elementa ekologio" (D-ro Carl Støp-Bowitz, v. supre)

"Segmentumitaj animalaj grupoj" (D-ro Carl Støp-Bowitz, v. supre)

"Enkonduko — La lim-disciplinoj de la lingvistiko" (D-ro István Szerdahelyi,

profesoro-fakgvidanto de la fako Esperanto-lingvo kaj literaturo – Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝt; Hungarujo)

“Socilingvistikaj studoj” (D-ro István Szerdahelyi, v. supre)

“Kontaktologio” (D-ro István Szerdahelyi, v. supre)

La SUK-estraro estas intertraktanta kun pluraj universitataj profesoroj el diversaj ŝtatoj koncerne pliajn kursojn.

KOTIZOJ

Parto- preno dum Semajnoj	Kategorio A		Kategorio B	
	kotizo (belgaj fr.)	deviga antaŭpago	kotizo	deviga antaŭpago
3	5.000,—	1.300,—	8.000,—	2.000,—
2	4.000,—	1.000,—	6.000,—	1.500,—
1	2.400,—	600,—	3.500,—	900,—

Kategorio A: studento aŭ persono fininta siajn studojn antaŭ ne pli ol unu jaro; maksimuma aĝo: 30 jaroj.

Kategorio B: aliaj personoj.

Stipendioj

Disponeblas subvencioj, interalie 2 stipendioj de “Institucio Hodler 68” de po 6.600,— bfr. destinitaj al studentoj de socio-lingvistiko, biologio aŭ kemio venantaj el ŝtatoj kun transpagaj problemoj.

Tiuj personoj kaj institucioj kiuj deziras ebligi al studentoj partoprenon en SUK-1974, povas tiucele starigi stipendiojn.

Kursotekstoj

Por daŭre kontribui al la plivastigo de la scienca literaturo en Esperanto, la a.s.p.c. “Someraj Universitataj Kursoj” publikigos ankaŭ la tekstojn de SUK-1974 kiuj aldoniĝos al la kursotekstoj pri SUK-1972, el kiuj estas nuntempe livereblaj jenaj titoloj:

“Enkonduko en la komputeran lingvistikon” de H.D. Maas,

“Bazaj nocioj de biologio” de C. Stöp-Bowitz,

“Farmakologio por malbonuzoj de medikamentoj” de S. Tadokoro.

Por kiu ajn informo oni turnu sin al: Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio).

La SUK-estraro.

EŬROPA ESPERANTO-CENTRO

KONVENCO

La 10-an de junio 1973, en Luksemburgo, Esperanto-Asocioj de la landoj apartenantaj al la Komuna Merkato (E.E.K.), decidis kunordigi sian estontan agadon por la enkonduko de la L.I. Esperanto en la Eŭropajn Instituciojn.

Tiucele estas kreita “Eŭropa Esperanto-Centro por la landoj de la Komuna Merkato”, kies gvidadon plenumos honorofica komitato konsistanta el unu direktoro, unu administranto kaj po unu reprezentanto nomita de la koncernaj Landaj Asocioj.

Komune estas konsentite pri jenaj antaŭvideblaj taskoj:

Por la Landaj Asocioj:

- Nomi kompetentajn personojn por reprezenti la Asocion kaj krei aŭ revigligi la L.A.-komitatojn por la Eŭropa agado;
- Daŭre informi la parlamentanojn (minimume la membrojn de la Eŭropa Parlamento), kun la celo starigi parlamentan grupon;
- Krei specialajn kursojn por la oficistoj de la Eŭropaj institucioj sur la teritorio de la L.A.
- Publikigi en la asociaj revuoj ĉiujn informojn pri la Eŭropa agado kaj propagandcele utiligi ĉiujn aŭdo-vidajn rimedojn por la disvastigo de tiuj informoj;
- Transsendi komunikojn al Eŭropaj revuoj, aperantaj sur la teritorio de la L.A.

Por la Centro:

- Kunordigi la agadon en la “Eŭropa Movado”;
- Kunordigi la agadon en la “Eŭropa Instruista Asocio” (A.E.D.E.);
- Kompili dokumentaron (Eŭropaj parlamentanoj – Elstaraj Eŭropistoj favoraj al Esperanto – Listigo de Eŭropaj fakaj revuoj, k.t.p.);
- Zorgi pri kohera kunlaborado kun U.E.A., S.A.T., T.E.J.O. kaj koncernataj fakaj asocioj;
- Kunmeti informajn komunikojn;
- Instigi al kompilado de speciala terminaro pri administracio, diplomatio, ekonomio, juro kaj politiko;
- Instigi al traduko de Eŭropaj traktatoj.

La financadon de la Centro liveros speciala “Eŭropa Fonduso,” donace aŭ subvencie provizata.

Pri la vivo de la Centro ekskluzive kaj solidare kompetentas la asociiĝintaj Landaj Esperanto-Asocioj.

BIBLIOGRAFIO

Adolf Holzhaus "Doktoro kaj Lingvo Esperanto". 524 paĝoj; forte bindita; eldonis la Fondumo Esperanto. Adreso: Esperantotie 4, SF-02220 Iirislati Finnlando. Prezo 675 fr.

Jen libro kiu meritas tre detalan priparoladon pro ĝia grandega valoro. Efektive ĝi estas nepre nemalhavebla por ĉiuj kiuj volas koni la personon Zamenhof kaj la komencan historion de nia lingvo kaj movado. Post artikolo kiu bone konatigas al ni la patron de Ludoviko, sekvas tre detala esploro pri la lingvokono de nia majstro. La aŭtoro pritraktas ankaŭ la pseŭdonomojn kiujn uzis Z. Tre interesa estas la parto en kiu li indikas la devenon de niaj afiksoj; kun la multaj komparoj kun naciaj lingvoj; kaj de la korelativoj. Li publikigas ankaŭ la unuan liston de adeptoj de nia afero; liston kun stratoj kiuj portas la nomon de Z. aŭ de E.; liston de memortabuloj kaj — plej interese — de E.-monumentoj. Ĉe tiu lasta oni trovas detalojn pri inaŭguro. Ĉio estas abunde ilustrita. Ankaŭ post ĉiu ĉapitro sekvas la fontindikoj tiel ke oni povas kontroli kaj ke do la verko havas scienca karakteron. Tio ne estas ĉio. Okaze de la pritraktado de ĉiuj tiuj punktoj la aŭtoro enŝovis, por pravigi siajn asertojn, amason da plej diversaj dokumentoj, tiel ke ni ekscias trezoron da sciindaĵoj pri faktoj kaj personoj el nia movado (ekz.: pri la persono de L. Tolstoj, pri la Rusa cenzuro ktp. ktp. Pri ĉio tio konsultu la indekson. Fine ni ne povas ne menciigi ke la libro estas eldonita je la kostoj de la verkinto (sendube grandaj) same kiel li pagis la eldonon de sia verketo pri la unua mecenato de E., nome Trompeter kaj pri la "Hilelismo" de Z. Ni notu ankoraŭ ke la libro estas tiel eldonita ke ĝi estas ornamo de la biblioteko.

Prof. D-ro H. Fortmann: "Orienta Renesanco". El la nederlanda tradukis E.N. Mulders. Eldonis la Internacia Katolika Informejo en Tilburg en la jaro 1972. 56 paĝoj. Prezo: 3 Ned. Gld. (plus afranko de 0,60 Ned. Gld.)

Tiu ĉi libreto estas eksterordinare riĉa je ideoj. Do ĝi estas por pensantoj! Eble vi pensas: ho, ne por mi. Mi preferas la agantojn! Sed ĉiam la pensado devas antaŭiri la agon! En jena broŝuro la aŭtoro, fama Nederlanda filozofo, apudmetas la fundan spiriton de la okcidento kaj tiun de la oriento. Do ĝi postulas tre atentan kaj malrapidan legadon. Sed kiom fruktdona estas la legado! Ni devas danki ĉiun entreprenon kiu igas la homojn pensi. Do, ni devas danki ankaŭ tradukinton kaj eldoninton de tiu ĉi libreto. Eble ili ne konsciis ke per tio ili faris ankaŭ grandan servon al la E.-movado, ĉar post pristudo de jena broŝuro la gvidantaj Esperantistoj komprenos kial nia movado signifas grandan kaj profundan ŝanĝon de la mondo, kaj kial ĝi povas progresi nur tre malrapide.

La 2-a Bruga Libro-borso (31 marto-9 aprilo 1973)

Ĝi okazis la unuan fojon en 1972 sed tiam ni ne partoprenis pro la altaj kostoj. Kelkajn semajnojn poste mi eksciis ke la kulturaj organizaĵoj ricevis partoprenrajton senpagan. Mi tuj direktis min al unu de la ĉefaj organizantoj kiun mi cetere bone konas. Li promesis saman rajton por Esperanto en la venontjara borso. Tio do okazis nun. Tamen ĉi-tiun fojon ankaŭ la kulturorganizoj havis kelkajn financajn ŝarĝojn — kiujn ni volonte prenis sur nin; en la espero ke la klopodoj kaj elspezoj estos tamen utilaj por la propagando de nia lingvo. Nun post la fino ni rajtas esti kontentaj. Ĝi estis ja sukceso. Unue la stando mem povis rivali kun la aliaj. La La aspekto estis bela. La ekspoziciita materialo estis interesa. Ĝi vekis la atenton de tre multaj vizitantoj. Inter ili multaj tute ne povis imagi ke en Esperanto jam ekzistas tiel ampleksa literaturo. Multaj demandis pliajn informojn kaj manifestis interesigon por venonta kurso. Ni esperu ke je tiu dato ili efektive venos. Al tiuj multaj interesigantoj ni povis doni iun faldfoliojn, kaj ni eĉ vendis nombron da vortaretoj, lernolibroj kaj ekzempleroj de la broŝuro pri la esencaj faktoj de nia lingvo kaj movado.

En la kadro de la libro-borso estis organizitaj kelkaj konferencoj pri diversaj literaturaj temoj, verkoj kaj personoj. Mi kaptis tiun eblecon por enŝovigi ankaŭ konferencon pri la Esperanto-literaturo. Tiu konferenco estis do ankaŭ afiŝita en la programo kiu estis disvastigita per multegaj ekzempleroj en tuta Flandrujo. Cetere iu raportisto de "Het Rijk der Vrouw" venis speciale el Antverpeno por aŭskulti, kaj verki artikolon kun ilustraĵo. Ankaŭ ĵurnalistoj de la loka "Brugsch Handelsblad" venis kaj tre favore skribis. Ĉeestis ĉirkaŭ 40 personoj; inter ili ĉirkaŭ dekkvin neesperantistoj, plejparte junaj personoj. La tasko estis ne tre facila pro la fakto ke mi troviĝis antaŭ esperantistoj, kiuj do jam multon scias, kaj aliaj por kiuj ĉio estis nova. Mi volis ankaŭ plejeble kompletan, kaj pritrakti la religian, sciencajn, komercan, turisman kaj aliajn literaturojn en Eo. Fine mi volis ankaŭ paroli pri la arta literaturo kaj montri la artan valoron de ĝi. Tion lastan mi povis fari nur per unu ekzemplo. Ja, mi paroladis dum unu horo. Unu de la ĉeestantoj, verkisto, esprimis la deziron ke en alia konferenco mi pritraktu nur la artan

aspekton de la esperanto-literaturo. Post tiu konferenco ni iris denove al la stando, ĉar kelkaj, i.a. la raportistoj, volis "de visu" konvinkiĝi pri tio kion mi diris. La hazardo faris ke je tiu momento iu japano promenadis ĝis nia stando, tre atente rigardis al ĝi, kaj tiam komencis alparoli nin. en Esperanto. Granda surpriziĝo ĉe la ĉirkaŭstarantoj. Kaj tuj kelkaj pliaj fotoj! Ja, fakto multe pli impresas kaj konvinkas ol mil teoriaj argumentoj. Resume: Ni konatigis Esperanton kaj la movadon al interesa publiko. La organizantoj de la libro-borso ekhavis (altan) estimon por niaj lingvo kaj movado. Espereble la kurso kiun ni organizos estos sukceso. F.R.

LA GRUPO EN EUPEN AKTIVAS

Fine de junio okazis la Esperanto-ekzamenojn en tri lernejoj de la Eupena regiono, nome en la Reĝa Ateneo kaj en la "Collège Patronné" de Eŭpeno kaj en la ŝtata Meza Lernejo de Welkenraedt. Entute 30 gelerntoj sukcesis en la ekzameno.

La estraro de BEF gratulas pro tiu ĉi senprecedenca sukceso kaj dankas tutspeciale al s-ino Vertongen, la motoro de la nova grupo!

Kelkajn semajnojn antaŭ la lerneja jarfino, okazis Esperanto-festo kie ĉeestis ĉ. 40 plenkreskuloj kaj granda grupo da gejunuloj. El la programo ni ĉerpas jenajn erojn:

- ĉu tio do — la vivo?
- al diino amikeco
- la tuta jaro sur mia gitaro
- teatraĵoj
- dancoj
- kantoj

Ni funebras kaj kondolencas

La 5-an de majo forpasis en Eŭpeno, Mathias Zimmermann, 70-jara, membro de la Sankta Franciska Ordeno kaj dum multnombraj jaroj Direktoro de la Brusela Banko en Eŭpeno. En 1969 li membriĝis kaj fariĝis aktiva, fervora Esperantisto. La Esperanto-Klubo perdis tre bonan kaj sindoneman membron.

NIA KALENDARO

27 decembro 1973 — 3 januaro 1974:
16-a Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Kassel (Germanujo). Informoj kaj aliĝoj: Belga Esperantista Junulara Asocio, Drakenhofiaan 97, B-2100 Deurne.

Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.V.B.A.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631

Hoboken

Vitraloj - Speguloj -

„securit“ vitro

kolorigitaj vitroj

aluminiaj senmastikaj

stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por

tutvitra-konstruaĵoj

mastiko

Telefono 272875